# SUDFRANCIA STELO

## Esperanto-federacio Langvedoko-Rusiljono

*Ni ne povis kunfesti la Zamenhofan tagon kaj la jarfinon sen eldoni novan SFS-on !*

*Tiun duan eldonon de 2019 iomete rapide ni preparis, do bonvolu pardoni kaj la aspekton kaj la eventualajn erarojn !*

*Ni esperas, ke ĝi daŭre vivos kaj ke vi ĝin ŝatos.*




## Kion vi trovos en ĉi-tiu SFS ?

- 3 interesajn artikolojn de Louis por (re)malkovri belaĵojn kaj strangaĵojn de nia regiono
- Jean Marie rakontas al vi la UK-on 2019, kvazaŭ vi partoprenis !
- Louis ankaŭ instruos vin per 2 « kialaj » artikoloj

## Bonan legadon !

# ***La lago de Sarrans (departamento Aveyron) kaj ĝia strangaĵo, ve preskaŭ ĉiam nevidebla***

*Verkita de Louis Ensuque*

*En 1934, nome de la hidroelektra progreso, pluraj vilaĝoj disigataj en trideko de km, estas subakvigitaj por konstrui sur la rivero la Truyère la baraĵon de Sarrans, (la plej proksima vilaĝo) kaj la lagon kiu kuniras.*

*Printempe de 2014, por kontroli la staton de la baraĝo, EDF (Elektro de Francio, tio estas ĉefa franca entrepreno pri produktado kaj distribuado de elektro) zorgis pri la malplenigo de la lago. Dum somero kaj kun permeso de EDF, miloj da scivolemuloj venis por vidi .... por kion vidi ?*

*Nu, la vegetaĵaron aŭ pli ĝuste la neekziston de vegetaĵaro, sed ankaŭ kaj precipe por vidi ...ponton. Jes ja, ponto kaj plie ponto, kiu restadis en akvo de post 80 jaroj, ĉu tio vere meritas tian valorigadon kaj tutan paragrafon !! Nu vi bonvolu legi tuj malsupre la klarigantan teksteton kaj poste vi mem taksos !*
*Jes, kia ponto !* ***La gotika ponto de Treboul*** *(tiu vilaĝo malaperis, nun subakvigita, kaj restas neniu domo) datiĝanta de la XIV-a jarcento kaj konstruita de la Angloj, estis impostponto ĝis 1740. La vizitintoj de la somero 2014 rajtis senpage transpasigi ĝin. Ĝi ankoraŭ staras !*

*Feliĉe ĉar* ***ĝi estas unu el la maloftegaj laboraĵoj, klasifikataj kiel historiaj monumentoj (ĝi estis tia en 1927), kiuj estas tiom malofte videblaj.*** *La unuan fojon de post la konstruado de la baraĝo, la lago estas komplete malplenigita. EDF asertas ke ĝi de nove malfermos la kluzpordetojn kiuj ebligas malplenigi tiun lagon post 40 jaroj ! Necesas 4 monatoj pli malpli por de nove plenigi la lagon.*

*Pri la preskaŭ sama temo, ni atentigas la leganton ke ekzistas en Langvedoko-Rusiljono 3 grandaj artefaritaj lagoj : lago de Naussac apud Langogne en la departamento Lozere, lago de Villefort, vilaĝo de la departamento Lozere, sed situanta tuj norde de la departamento Gard kaj lago de la Salagou (rivereto apud Clermont l'Herault kaj Lodeve en la departamento Herault ; ĉiu malaperigis almenaŭ unu vilaĝon. Tamen la lago de la Salagou enabismigis nur la tombejon de la vilaĝo Celle. La lagon de la Salagou neniam oni komplete malplenigis(os) pro tre simpla kialo : necesus 4 jaroj por de nove ĝin plenigi.*
*Sed per modernaj teknikoj, la kontroloj de la baraĵoj nun fariĝas danke al robotoj kaj skafandristoj.*



# ***La « castellum divisorium » en Nîmes : kio estas tio ?***


*Verkita de Louis Ensuque*

*Nîmes havas multajn monumentojn el la romia epoko. Unu el ili, kompreneble multe malpli vizitata ol la plej konataj (« la Arenoj » aŭ « la Maison carrée », tio estas « la Kvadrata Domo »), estas tre, tre interesa : temas pri la « **castellum divisorium** », netaŭga nomo sed tre belparola. Ĝi troviĝas Strato de la Lampèze, piede de la citadelo de Vauban, iĝinta unue malliberejo kaj poste dependaĵo de la universitato.*




*CASTELLUM AQUAE en la latina, tio estas akvujo, aŭ pli ĝuste, baseno por akvodispartigo*

*Temas pri cirkla baseno (diametro : 5,50 m) en kiu la akvo alvenas per volbita kanalo por esti distribuita per 10 cirklaj ĝemeligitaj malfermaĵoj, kiu direktiĝas al 5 diversaj direktoj cele al ĉiuj malnovaj kvartaloj de la urbo. Tiu malgranda monumento, preskaŭ unika en la romia teritoriomondo (ekzistas nur unu cetera en Pompei, Italio), estas escepta pro la informoj kiujn ĝi liveras pri la akvosistemo kaj la akvocirkvitoj de la romiaj urboj dum la antikvaj tempoj.*




*La irvojo de la akvo, el Uzès ĝis Nimes*







*Je la fono, akvoalveno ekde la fonto proksime al Uzès kaj post irvojo de 50 km pasanta per la fama ponto super la rivero Gard.*

*Je la unua plano, 4 ŝtopiloj (duope) el 10 entute, laŭ kiuj pasis la plumbtubaro por konduki la akvon ĝis la malsamaj kvartaloj de la urbo Nimes.*

## ***La vegetaĵoj « de Montpeliero »***

*Verkita de Louis Ensuque*

*Kiel ĉiu scias, aŭ devus scii, la urbo Montpeliero posedas la plej antikvan botanikan ĝardenon el Francio, kreitan en 1593 sub la reĝado de la franca reĝo Henriko la kvara. Ĝi estas ankaŭ la sesa plej antikva el Eŭropo, post tiuj de Padoue (la unua do la plej antikva), de Pise, de Bologne (ĉiuj tiuj tri urboj en Italio), tiu de Leyde (Nederlando) kaj tiu de Leipzig (Germanio). La surfaco de la montpeliera botanika ĝardeno estas 4,5 ha (la kvara en Francio) kaj ĝi prezentas pli ol 2 000 plantajn specojn.*

*Ni precizigu ke la botanika ĝardeno de Parizo estis kreata en 1640.*

*Montpeliero havas almenaŭ 21 specojn (unu bestan : la montpeliera kolubro) kaj la ceterajn vegetaĵaraj, (ekzemple : krizantemo, citizo, acero, dianto, ranunkolo, adianto au harfiliko au venusharo, ktp), al kiuj oni donis ĝian nomon.*

*Oni povas, rajtas kaj eĉ devas sin demandi : « Kial tiom da flaŭraj specoj enhavas la nomon de la urbo Montpeliero ? »*

*La respondo estas tre simpla.*

*En 1737, François Boissier de Sauvages, tiama direktoro de la montpeliera botanika ĝardeno, plibonigas la forcejojn kaj ekkunlaboras kun la nun fama Svedo Karl von Linne, patro-iniciatinto de la botanika klasifikado. Kune ili nomos « monspelliensis », (tio estas « el Montpeliero » en la latina lingvo) iujn specojn.*



*Acero de Montpeliero*





*Folioj, floroj kaj fruktoj de la acero de Montpeliero*

# <u>**Kial ?**</u>

*Artikoletoj verkitaj de… Louis Ensuque !*

## *Kial en la franca lingvo, oni diras « Allo » kiam oni respondas al telefonalvoko.*

Efektive, tiun vorton la Francoj uzas nur en tiu okazo ! La telefonsistemon inventis Thomas Edison (kaj Graham Bell ankaŭ), do ni estis en Usono. En tiu lando, oni kompreneble parolis la anglan lingvon kaj do la persono kiu respondis al telefonalvoko diris kiel unuan vorton, « Hello », same kiel tiu sama persono diris kiam ŝi parolis, renkontante alion sur strato ekzemple aŭ en iu domo. Kiam Francoj ekuzis la telefonon, ili provis ekparoli sammaniere, sed mi opinias ke vi bone scias kiom naturdonitaj estas la Francoj (feliĉe eu iu senso, sed malfeliĉe en alia senso) por paroli aliajn lingvojn kaj precipe la anglan. Finfine, « Hello » iĝis « Allo ».

## *Kion signifas la vorto (angla kompreneble) « bug » kaj kial oni uzas ĝin ?*

Se paroli pri komputiloj, kiam io ne bone funkcias, oni ofte diras « mia komputilo « bug »-is, (kelkfoje prave, multfoje tute malprave, cetere). La angla vorto « bug » signifas « insekto » en esperanto ; sed atentu : « bug » signifas « insekto », tute ne « insekto », eĉ se iuj ankaŭ konsentus kun tiu dua signifo. Kiu estas la ligilo inter « insekto kaj komputilo ? Jen la klarigo : la unuaj komputiloj bezonis tutan ĉambron, eĉ plurajn ĉar ili enhavis multajn sufiĉe grandajn elementojn : arko- kaj pilot-lampojn, transistorojn, ktp. Kaj oftege, mankis mastrumado pro pluraj motivoj, sed ankaŭ tutsimple pro timo de difektiĝo de la kimputilo. Do svarmis insektoj, kaj precipe blatoj kiuj finfine, kun la tempo, vere difektis la komputilon, kiu tial kompreneble ne bone funkciis.

# <u>La 104-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Lahtio 20-27 julio 2019</u>

*<u>(FINNLANDO)</u>*

Aviadile mi vojaĝis el Ĝenevo ĝis Helsinki la 13-an de julio kaj ekskursis cirkaŭ la landon.

Mi vizitis muzeojn, konstruaĵojn, estas multe da arbaroj, mi vidis boacojn, kaj eĉ kontaktis esperantiston en Laponio per la apliko Amikumu...




Boacoj



lignadomo



ruĝa pinoj .kaj betuloj




La kongreso okazis en la sportejo de la hokteamo "Isku Areena", de Lahtio. La kongresa temo estis: "Vivanta naturo, floranta kulturo" Do, oni parolis, prelegis, ekskursis ofte pri la ekologio... "Lahtio estos la plej bona verda ĉefurbo de Eŭropo en 2021"

Dimanĉon, post la salutoj de ĉiuj landoj, (917 partoprenantoj el 70 landoj) oni kantis la Esperon, kaj la Prezidanto de UEA Mark FETTES malfermis la 104-an UK-on. Mi

renkontis aliajn Grenoblanojn (Marie-Thérèse kaj Nicolay DIMITROV. La Nacia vespero okazis en urba koncertejo ĉe la haveno "Sibeliusdomo"



La kongresejo




La estraro

Dum la vespero post la Registriĝo mi vizitis la Movadan Foiron kaj planis /organizis la sekvajn tagojn laŭ la programo proponita. Mi elektis la prelegojn pri la lando, kaj la kongresa temo, ankoraŭ teatraĵoj, muzikoj...

Mi ŝatis la prelegon ***"Esperanto antaŭen"*** de David YAKI, Kanadano kiu loĝas en Edmonton. Li varbas, kaj instruas en Kalgario ĉe junaj gekomercistoj per kartludoj...



Poste demandaro laŭ David, multaj homoj pensas, ke lerni Esperanton estas bona ideo, sed la plej multaj ne




volas ĝin nun ĉar tiel malmultaj homoj parolas ĝin. Se cent milionj homoj lernas Esperanton, ĝi fariĝos grava monda lingvo. Kun cent milionoj parolantoj, ĝi estus unu el la dek unuaj lingvoj en la mondo. Instrui Esperanton al 100.000.000 homoj estus granda paŝo antaŭen; sed akiri la unuajn 100.000 estas defio. Do, anstataŭ peti homojn lerni Esperanton nun, ni petas homojn promesi, ni pensas, ke ni havas eblecon transformi esperon en realecon...

Du aplikoj pri ĉi tiu temo:

- unu por esplori kaj promesi la lernadon de Esperanto; https://ea-mondo.org/pp/multi/
- la alia por interŝanĝi kaj lerni interrete; https://www.mylanguageexchange.com/





Dum la UK nova estraro estis elektita :
Prezidanto: Duncan CHARTERS ;
Vicprezidanto: Fernando MAIA ;
Vicprezidanto: HUANG Yinbao (Trezoro) ;
Ĝenerala Sekretario: Aleks KADAR ;
Orlando E. RAOLA, Jérémie SABIYUMVA, SO Jinsu kaj AmriWANDEL.

Merkredon, Tuttagaj ekskursoj. Mi elektis viziti la farmobieno kiu produktas cerealojn (aveno, tritiko, sekalo) en ekologia terkultivado. Konatiĝo de la biena vivo kie oni trinkis kafon kaj gustumis kukon. Poste ni iris al la naturfonto, la plej granda de Finnlando *(400m longa x 100m larĝa)*. Ĝia turkiskolora akvo estas belega fenomeno. Ni daŭrigis la vojaĝon por konatiĝi kun la mezepoka preĝejo kaj la artgalerio dela artistino Asta Pulkkinen, kiu specialiĝis pri la naivstilo.



Ekveturis al la bienego laŭ lagborda vojo. Kie ni havis lunĉon el naturaj produktoj ‘’bonegan tagmanĝaĵon‘’. La bieno funkcias laŭ la koncepto de ekologia agrikulturo ili bredas ŝafojn, adminitris arbarojn, kaj gastigas/akceptas turismgrupojn.

Dum la solena fermo, la prezidanto dankis la Finnlandan komitaton, kaj la helpantojn.
Post la transdono de la flago al la kanadoj kaj la bonvenaj vortoj, la infanoj vizitis nin kaj kantis.



